

## Hector Hodler: Praktika internaciismo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1987 januaro 29 kaj 31

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Ĉiuj esperantistoj konas la nomon de Hector Hodler, la fondinto de Universala Esperanto-Asocio. Sed malmultaj intimiĝis kun liaj personeco kaj penso. Tial dum tiu ĉi vintro ni markos la centjaran jubileon de lia naskiĝjaro relegante al vi prelegaron, kiun ni jam prezentis antaŭ ok jaroj.

A.- En artikolo titolita **Unueco** publikigita en januaro 1911 en la revuo Esperanto, Hector Hodler skribis tiun ĉi pripensigan frazon:

Cl.- "Ni havas sufiĉe da talentaj instruantoj pri Esperanto, sed kiom da **edukantoj pri Esperantismo?**"

A.- Kaj tuj poste li tiel priskribis la taskon de la edukantoj pri Esperantismo:

Cl.- "Ni bezonas kelke da homoj penetritaj de la alta signifo de Esperantismo, homoj kiuj komprenigus al la Esperantistaro la socian valoron de Esperantismo, kiuj aplikus ĝin al la diversaj problemoj de la internacia vivo, kiuj helpus la kreon de tiu komune-homa kulturo, ĉerponita sian vivsukon el Esperantismo kaj radionta super niaj gentaj kulturoj. Tio estas, ni konfesas, grandega tasko, kiu ne estos plenumata en kelkaj jaroj, sed tio ne devas esti preteksto por ĝin neniam komenci. Ĉu la praktikado de Esperantismo, la vivado en organizaĵoj bazataj sur ĝi, liveros al ni kelkajn tiajn homojn, aŭ ĉu ni devos ankoraŭ longe atendi?"

A.- Hector Hodler konsideris, en januaro 1911, ke ĝis tiam fakte nur unu esperanto-verkisto plenumis tiun ĉi taskon de edukanto pri Esperantismo:

Cl.- "Zamenhof, kiu en malmultaj paroloj ĵetis tiel profundajn lumojn pri la socia signifo de Esperantismo."

A.- En la paroladoj, kiujn Zamenhof prononcis en Bulonjo-sur-Mar, en Ĝenevo kaj en Kembriĝo, Hector Hodler trovis la inspiron al praktika esperantismo, kiun li mem diversmaniere priskribis. Jen signifoplena citaĵo el artikolo aperinta en julio 1911:

Cl.- "Tro multe da niaj samideanoj konsideras Esperantismon el loka aŭ nacia vidpunkto. Ilia horizonto ne celas trans la limoj de ilia urbo aŭ maksimume de ilia lando. Nu, konvenas ĝin ripeti, kvankam eĉ la simpla cito de tiu vero ŝajnos nenecesa, Esperanto estas antaŭ ĉio **internacia** afero; ĝia celo, nuna kaj estonta, estas faciligi la interpopolajn rilatojn. Multaj tion tute forgesas kaj konsideras kiel ĉefan aferon la propagandon de Esperanto en sia loko; ĝia internacia uzado venos poste... se ĝi venos. Ili ne atentis, ke dek personoj vivantaj en dek diversaj urboj kaj interrilatantaj per Esperanto, estas multe pli utilaj ol grupo de cent aŭ du cent personoj en unu urbo, uzantaj... sian nacian lingvon por paroli pri Esperanto... Ju pli grandiĝos la nombro de la personoj internacie uzantaj Esperanton, des pli forta estos nia movado." Esperanto sin trudos antaŭ ĉio per **praktika internacia agado**.

A.- Por Hector Hodler la esperantismo estas praktika internaciismo. Jen tiurilate citaĵo el parolado, kiun li prononcis en Krakovo okaze de la tria UEA-kongreso. Ĝi aperis en la revuo Esperanto en septembro 1912:

Cl.- "La internaciismo de UEA estas pozitiva; ĝi ne konsistas el vortoj, sed el agado. Se ni volas, ke la vivo internacia estu io alia ol motivo de paroladoj, ni devas klopodi por ĝin realigi, antaŭ ĉio krei inter la homoj praktikan servaron, ligi ilin per organizo, insisti pri tio, kio ilin unuigas. Ekster tio ni vidas nur vanajn alvokojn pri frateco, konfuzajn aspirojn, kies rezultatoj estas sensignifaj."

A.- Por Hector Hodler, anstataŭ prediki, oni agu. Oni prediku la plibonigon de la interpopolaj rilatoj pere de precizaj agadoj, kaj sen devigi la aliajn homojn partopreni la eksperimenton. Jen tiurilate signifplena citaĵo el la sama parolado:

Cl.- "Ni grupigas nur la homojn, kiuj deziras esti grupigitaj. Antaŭ ol proponi al la mondo ideon, kiel ajn bela ĝi estas, ni vidu, ĉu ĝi estas realigebla por limigita nombro de homoj. Tiun eksperimenton plenumas UEA, en tre modesta mezuro... Prediki al la mondo kaj poste realigi, estas la metodo de la teoriistoj. Oni ĉiam estas prava, kiam oni nur bezonas aserti. Ni preferas... agi unue, poste prediki..., se tio estas ankoraŭ necesa. Kun nia limigita celo ni opinias, ke ni tiel utile laboras, se ne pli, por la plibonigo de la interpopolaj rilatoj, ol tiuj homoj, kiuj konstante parolas pri frateco inter la popoloj, kaj neniam faris ian seriozan klopodon por eĉ parte efektiviĝi siajn ideojn en la reala vivo."

A.- Hector Hodler alvokas je modesteco kaj firmeco praktika:

Cl.- "Ĉiam rememoru, ke la faktoj naskas la teoriojn, ne la teorioj la faktojn; irante senŝancele nian tre klaran vojon, plenumante bonhumore nian modestan ĉiutagan taskon, ni paŝon post paŝo, kun via helpo, faros el UEA, vere fruktodonan socian forton, kiu ludos atentindan rolon sur la kampo de la homaj interrilatoj."

A.- La postan jaron, tio estas en 1913, en alia parolado Hector Hodler revenis al la temo esperantismo kaj internaciismo, por komprenigi al la UEA-anoj, ke la servoj, kiujn ili proponas havas praktike instruan rolon. Jen lasta, pripensiga citaĵo:

Cl.- "Estas la honoro de Esperantismo, ke ĝi penas anstataŭi la pure teorian internaciismon per praktike travivata internaciismo, kiu, ne embarasante sin per formuloj aŭ doktrinfasadoj, rilatigas fremdulon kun fremdulo pri ĉiuj sferoj de la homa vivo, sur vere neŭtrala kampo. Per sia interŝanĝado de servoj ĉiujare pli multe uzata, UEA ne sole donas propran profiton al la uzantoj de tiuj servoj, sed ĝi praktike instruas al ili internacian spiriton, tio estas klarajn ideojn kaj ĝustajn konojn pri la vivo kaj mentaleco de la diversaj popoloj, sen kio ĉia alia jura alproksimiĝo estas neplenumbla en vere sincera maniero.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond raportis pri la esperantismo aŭ praktika internaciismo de Hector Hodler. Ĝis reaŭdo !